
tempo

Gazeto de Kroata Esperanto-Ligo
Časopis Hrvatskog saveza za esperanto

oktobro 2020 / n-ro **136**



Adiaŭ al Pajo - Zlatko Tišljar (1945 – 2020)

Adiaŭ al Davor Klobučar (1961- 2020)

Bjelovaraj esperantistoj al sia urbo – malgraŭ la kronviruso

Kroata Esperanto-Ligo kreis filmon pri sia agado

Karaj legantoj

La tutgloba kronvirusa epidemio detruis niajn printempajn kaj somerajn programojn. Ne okazis Printempa Semajno Internacia en aprilo en **Wittenberg** en Germanio, ne okazis la maja germana-pola fervojista Transponta Esperanto-Kongreso en **Frankfurt (Oder)/ Slubice**, ne okazis la 105a Universala Kongreso de Esperanto en **Montrealo** en **Kanado**. La viruso malebligis la ĉijarajn renkontiĝojn. Sed okazis io alia. Okazis Mondafest. La tutmonda trimonata aranĝo kadre de kiu okazis virtuale Universala Kongreso de Esperanto kaj Internacia Junulara Kongreso kaj Somera Esperanto Semajno. Universala Kongreso de Esperanto 2021 estas planata en **Belfast**, en **Norda Irlando** kaj en la 2022 en **Montrealo**.

La Mondafest daŭris rete de la 20a de junio ĝis la 20a de septembro 2020 kaj al ĝi iom kontribuis ankaŭ **Kroatio**.

Dum la julia reta komitatkunsido de Universala Esperanto-Asocio **Zlatko Tišljar Pajo** estis elektita por honora membro de UEA.

Gejunuloj en SEK organizis kaj filmis 3-minutan filmon kiu estis prezentita dum Mondafest kaj kiu gastis en Eŭropa tago de Mondafest. Filmis **Kruno Tišljar**, muntis **Branka Sacher**, rolis **Filip Mikuličić**, **Robert Milijaš**, **Juraj Drnjević**, **Đivo Pulitika**, **Siniša Dvornik** kaj **Spomenka Štimec**.

Spomenka Štimec partoprenis aparte la virtualan aŭtoran duonhoron, (helpata de **Đivo Pulitika**, **Branka Sacher** kaj **Robert Milijaš**), intervjuata de **Sara Spano** kaj **Nicola Ruggero**.

Okaze de la virtuala programo omaĝe al la verkistoj - geedzoj **Julia Sigmond** kaj **Filipo Francesci** (**Sen Rodin**), kiuj mortis en marto 2020 pro kronviruso, siajn memorojn pri ili prezentis **Spomenka Štimec** kun **Robert Milijaš** la 20an de septembro 2020.

Forte trafis la kroatan kaj la mondan Esperanto-Movadon du mortoj: la 29an de julio subite mortis vicprezidanto de Kroata Esperanto-Ligo inĝ. **Davor Klobučar** el **Osijek**. Al li ni dediĉis specialan programon en Esperanto-Societo *Tibor Sekelj* la 14an de oktobro. La 8-an de septembro post longa kaj suferiga malsano mortis en sia hejmo en **Velika Gorica** la motoro de la kroata Esperanto-Movado **Zlatko Tišljar - Pajo**. Ni publikigas lian adiaŭan poemon dorspaĝe de nia revuo. Samurbe mortis la 27an de septembro **Stjepan Žarina,** prezidanto de Esperanto-Klubo en **Velika Gorica.** Ni devas daŭrigi sen ili, daŭre sub la premo de kronviruso.

Interesan kunlaboron ni realigis kun la zagreba Akademio de Drama arto: juna reĝisorino **Petra Pavetić-Kranjčec** filmis en niaj ejoj sian diplomfilmon, luinte la apartamenton *Espera*. Interesa sperto!

Bojan Tišljar helpis havigi por Vodnikova klapseĝojn, kiuj iam ornamis la kafejon de la kinejo **Eŭropa**.

Nia nova membrino **Branka Sacher,** esploristino pri nutraĵoj kaj manĝkutimoj, esperantigis sian libron *Manĝeroj* el kiu ni publikigas fragmentojn.

Đivo Pulitika daŭre gvidas kursojn per Interreto.

En **Bjelovar** okazis la 8an jaron sinsekve la programo *Bjelovaraj esperantistoj al sia urbo*. La 19an de septembro 2020 kadre de la programo okazis en **Bjelovar** la Jarunveno de Kroata Esperanto-Ligo kiun ĉeestis 19 (el 35) asembleanoj. Pro kronviruso ni prokrastis la jarkunvenon de printempo al aŭtuno. La viruso iom reduktis la programon en **Bjelovar**. Okazis tamen diversspecaj programeroj, la meso, gvidita de la pastro **Rikard Patafta**, ekspozicio *Kroatoj en Ĉilio,* ekspozicio de akvareloj de franca pentristino **Lili Giloteaux** (1924-2013).

La partoprenintoj povis tamen ĝui en la ekskurso kiu unue gvidis al Dokumenta Esperanto-Centro en **Đurđevac**, kie ni povis vidi kiel progresas la konstruado de Dokumenta Esperanto-Centro de **Josip Pleadin.** Poste ni daŭrigis trans la rivero **Drava** al *Dravska Iža* en **Križnica** kaj ĉeesti la lanĉon de nova infanlibro de **Julian Modest** *La aventuroj de Jambol kaj Miki.* La libron ilustris **Ivana Pleskina**.

Fervojistoj-esperantistoj pro la tertremo devis elloĝiĝi el la ejoj de Kroata Fervojista Esperanta Asocio, ĉar multaj fervojistaj oficistoj ne plu povas uzi la antaŭajn oficejojn. La estraro provizore laborigis ilin eĉ en la ejoj de la fervojista Esperanto-Klubo. Tial la 6an de oktorbo okazis prelego honore al 160 jaroj de la fervojoj en Kroatio en la ejoj de KEL. Prelegis D-ro **Zlatko Hinšt.**

La aŭstralia esperantisto **Will Firth,** loĝanta en Berlino kie li laboras kiel profesia tradukisto el pluraj slavaj lingvoj**,** gastis en Esperanto-Societo *Tibor Sekelj* la 14an de oktobro 2020.

Zagrebo iom mildigis siajn vundojn ricevitajn dum la marta tertremo. Renkonstruendaj estas multaj el 20000 fumtuboj. Dum ni finas tiun ĉi numeron sur la tegmento de la konstruaĵo en Vodnikova 9, laboras riparistoj de fumtuboj. La malfacila kaj multekosta laboro komenciĝis. Ĉu ĝi finiĝos antaŭ la pluvoj?

Spomenka Štimec

tempo

Fondita en 1980. Ne aperis en la militaj jaroj 1993 kaj 1994. Post la jaro 2017 aperas du fojojn jare rete kaj sur KD. Ĝis la jaro 2017 aperis papere. Jaro XL (40), numero 136 (2/2020). ISSN0352-1583. Sona numero 54/2020.

Tempo aperas sone sur kompaktdisko ĉe Kroata unuiĝo de nevidantaj esperantistoj en Zagrebo ekde 2004. Voĉlegas Spomenka Štimec kaj Neven Kovačić. La reta versio de Tempo ĉe **www.esperanto.hr/tempo_kel.htm**

Redakcio/Uredništvo; **Eldonisto/Izdavač** Hrvatski savez za esperanto / Kroata Esperanto-Ligo, Vodnikova 9, HR10000 Zagreb, Kroatio, +385 (91) 4617550; esperanto@zg.t-com.hr, www.esperanto.hr; IBAN HR6124840081100881157; OIB 53992829935

Kontribuis: Ana Alebić-Juretić, Mila Bečka, Roža Brletić-Višnjić, Kaja Farszky, Sanja Forjan-Pleskina, Ana Klobučar, Zdravka Metz, Antun Nikolić, Josip Pleadin, Nikola Rašić, Branka Sacher, Julia Sigmond, Vlatko Škorić, Spomenka Štimec, Ivan Špoljarec, Krunoslav Tišljar, Zlatko Tišljar.

Redaktoris: Spomenka Štimec. **Grafika aranĝo:** Ivan Špoljarec.

La redakcio ne respondecas pri la opinioj de la subskribitaj artikoloj.

Foto sur la titolpaĝo: Zlatko Tišljar - Pajo, 2011, okaze de la 44a PIF. (Fotis Ivan Špoljarec)

Omaĝe al ZLATKO TIŠLJAR – PAJO



Pajo, 1984.

La 8-an de septembro je la 9-a horo mortis Zlatko Tišljar – Pajo, unu el la plej gravaj esperantistoj de lastaj 50-jaroj. Li naskiĝis en 1945 kaj Esperanton lernis en 1962 en la fama SEK, Studenta Esperanto-Klubo en Zagrebo.


Lia graveco vaste transiris la limojn da la tri landoj en kiuj li vivis: Jugoslavio, Kroatio kaj Slovenio. Al ĉiuj tri landaj movadoj li abunde kontribuis kaj stampis ilin per sia forta personeco, enorma diligenteco, entreprenemo kaj senelĉerpa ideozeco. Li grave kontribuis ankaŭ al la internacia movado aktivinte en TEJO, UEA kaj EEU (Europa Esperanto-Unio), kies sekretario li estis dum jaroj. Li famiĝis ankaŭ kiel fondinto kaj 20-jara direktoro de IKS (Internacia Kultura Servo), unu el la plej sukcesaj profesiaj poresperantaj kaj peresperantaj entreprenoj. IKS funkciis en tiam socialisma lando; afero preskaŭ nepensebla eĉ tie, sed li trovis la manieron. Poste li ripetis la sukceson de IKS en sia egzilo en Slovenio, per la entrepreno Inter-Kulturo.

IKS gvidis la kroatan E-movadon en sian oran epokon: ĉie tra la lando furoris E-kursoj kaj diversaj aranĝoj perhelpe de Esperanto. La respekto por Esperanto fariĝis ĝenerala nacia afero, same ĉe la aŭtoritatoj kiel ĉe la popolo. Mi havis la impreson ke ĉiu tie sciis pri la lingvo kaj pozitive opiniis pri ĝi. Estis vere ĝua afero esperantumi en Krotio tiutempe. Tio kompreneble ne estis nur la merito de Pajo sed ankaŭ de la fama astronomia rondo ĉirkaŭ la revuo „Homo kaj kosmo“, kaj pluraj aliaj, sed Pajo kaj lia IKS donis al Esperanto freŝe modernan kaj utilecan aspekton.

Li estis sekvanto de alia granda jugoslava esperantisto Tibor Sekelj kaj lia IOE (Instituto por Oficialigo de Esperanto) kies baza ideologio konsistis en unu vorto: apliko. Oni devis montri ke Esperanto estas utila, apliki ĝin ne por la internaj rondofamiliaj celoj sed por la bono de neesperantistoj, de la ĝenerala socio. Al tiu ideo Pajo restis fidela ĝis la fino, ankaŭ kiel sekretario de EEU. Per Esperanto li ebligis al la aliaj ĝui la mirindecon de la lingvo kaj la internaciaj idealoj. En tio li kunlaboris facile kun ŝtatestroj, ministroj kaj kun simplaj laboristoj. Unu el liaj brilaj projektoj



Pajo kaj Tibor Sekelj, Osijek 1983.



Prelego en Otočac, 1981.



Prof. Chang Choong-sik, Spomenka kaj Pajo en Amruševa 5, 1987.

Pajo dum la lanĉo de ekspozicio "Prisportaj gazetoj" 1987.



estis PIF (Pupteatra Internacia Festivalo) en Zagrebo, eble la plej grava pupteatra festivalo en la mondo, kun Esperanto kiel oficiala lingvo. Alia brila projekto estis la Zagreba metodo, kie kunlaboris pluraj (interalie Tibor Sekelj, Spomenka Štimec, Roger Imbert) sed la ĉefa iniciato kaj ideo venis de Pajo. Ĉe tio li inspiriĝis de lia pasio, tiam ĵus aperinta cibernetiko kaj informatiko. Helpe de tiam tre raraj komputiloj li produkits frekvencmorfemaron de parolata Esperanto kaj surbaze de tio evoluigis la lernometodon kiu furoregis: tradukita al ĉ. 30 lingvoj, de la eŭropaj ĝis la kirunda de Burundio. Poste sekvis la serio de tekstoj en facila Esperanto, bazitaj je morfemaro de Pajo, je kio kunlaboris ankaŭ Claude Piron, Roger Imbert kaj pluraj aliaj.

Mi havis feliĉon observi tion el la unua mano ĉar Pajo estis la unua persono kun kiu mi iam parolis en Esperanto kaj poste mia mentoro kaj nestoro, tre proksima kunlaboranto kaj plurflanka samideano. Ĉion kion mi scias mi lernis de li. Ni ankaŭ kune studis ĝeneralan lingvistikon, kaj li paralele studis informadikon (dum mi sociologiumis alifake). Antaŭ tio li studis la germana kaj la jugoslavajn lingvojn. Sed li ankaŭ forte interesiĝis pri sociologio kaj la rilataj fakoj. Mi memoras kiom li entuziasmiĝis pri la teksto de la kosova sociologo Rexhep Qosja, kiun mi tradukis el al albana al la kroata en 1978. Ĝi titolis „La psikologio de mediokroj“. Tute brila teksto. Pajo tuj kreis la movadan varianton de la ideoj de Qosja verkinte sian faman artikolon „La rolo de mezkapabluloj en la Esperanto-movado“*, nuntempe pli aktuala ol iam. En la teksto de Pajo temis pri tio ke la Movado ne temas pri mediokraj minuskompleksuloj kiu ludas grandajn gvidantojn en la movada mikromondo sed ke necesas altiri altvalitajn talentajn personojn kiuj apliku Esperanton en siaj respektivaj fakoj kaj influsferoj. El tiu idea fono venis ankaŭ lia libro „Esperanto vivos malgraŭ la esperantistoj“ (ni esperu tiel!).

Tio estis Pajo: li kredis ke Esperanto entute ne temas pri la esperantistoj sed ke esperantistoj devus okupiĝi pri la vera mondo, ne pri sia ĝenerale neinteresa mondeto.

Por Pajo Esperanto temis pri io ekster la Movado, io grava kaj granda, ne malpli grava ol mondoplibonigo. Nu li certe sukcesis en tio, la mondo ĉirkaŭ li ĉiam riĉiĝis per io nova kaj kvalita dank' al Pajo kaj dank' al Esperanto. Li mankos al ni ĉiuj.

Nikola Rašić

- - - - - - - - - - - -

Fotoj de Ivan Špoljarec - Štef

* https://www.liberafolio.org/2020/09/09/la-rolo-de-mezkapabluloj-en-esperanto-movado/



La 10a PIF - 1977.



La 50a PIF - 2017.



Pajo en Vodnikova la 16an de januaro 2019.





Kelkaj el la pli ol 30 presitaj eldonoj de Zagreba metodo:



angla
portugala



itala
kirunda



japana
korea



franca
kataluna









PAJO – mia unua direktoro

Mi konatiĝis kun **Pajo** en **Varaždin** en 1968 kiam li venis kun **Davor Doršić** partopreni dimanĉan posttagmezon organizitan en Esperanto - klubo **Varaždin** fare de grupo MoZoMoA: Milka-Zdravka-Marijan-Anđelko. Dum tiu posttagmezo li sukcesis konvinki nin ke ni povus helpi al SEK-anoj prizorgi unu foje monate deĵoradon sur montgrimpanta domo sur **Cesargrad**.

Vivante en **Varaždin** en septembro 1970 mi gvidis du grupojn de pupistoj kiuj venis prezenti spektaklojn en kelkaj apudaj vilaĝoj kaj tiel mi komencis kunlabori kun IKS. (La lasta en 1984 ni prezentis en la varaždina teatro).

Alveninte en Zagrebon en 1971 mi jam komencis gvidi Esperanto-kurson en **Retkovec** por la granda celo de Pajo: havi la internacian infanan publikon por Pupteatra Internacia Festivalo - PIF. Poste mi gvidis infanojn al **Pečuh** (**Hungario,** 1973), **Cesena** (Italio, 1974), **Chester** (Anglio, 1975) kaj dum PIF venis la infanoj el tiuj landoj al Zagrebo spekti PIF-on. Tio estis nia internacia agado per interŝanĝo de lernejanoj.

Mi enskibis en 1975 la lastan jaron ĉe Ekonomia fakultato kaj IKS bezonis iun por la librotenado. Mi diris - jes al Pajo kaj dum tri jaroj mi laboris – fakte tio estis mia unua laborloko enskribita en "labor-libreto". Bonŝance ke **Ruža** volis helpi al mi dum la preparoj de financaj bilancoj de IKS. (Kiel IKS-ano mi multe ŝatis ke Pajo ne demandis nin sidi en laborejo certajn horojn, sed plej gravis por li ke la laboro estu farita.)

Pajo restis por mi neforgesebla, originala, unika, konvinkema, legenda persono.

IKS-anoj konsentos ke li bonege gvidis IKS-on finance, ĉiam aldonante al kultura laboro la presadon de instrumaterialoj. Ni havis tre modestan presejeton en kiu ni presis simplajn instruilojn por medicina lernejo. Tiun laboron ni nomis *lekado*, ĉar ĉiam ni devis leki t.e. humidigi la fingron per kiu ni kolektis la presitajn paperojn laŭpaĝe sternitaj antaŭ ni sur la tablo. El la kolektitaj paperfaskoj fariĝis instrukajero. Poste estis aĉetita la maŝino por kolektado de paperoj kaj la *lekado* ne plu estis necesa.

Mi memoras Pajon pro niaj grupaj manĝetoj - *gablec*. Lia ŝatata estis pano kaj '*korak jegera'*. Tio estis speco de malmultekosta salamo nomata *la ĉasista*, kiun Pajo ne mezuris per dekagramoj sed per paŝoj: alportu unu paŝon da ĉasista salamo!

Pajo havis ĉiam sian opinion, ofte avangardan! NE GEEDZIĜU! – li ofte ripedadis, sed ni ĉiuj tamen dancis dum edziĝvespero de **Pajo** kaj **Ruža**!

Pajo fidis al mi kiam li decidis vojaĝi al **Grekio** 1976 per eta aŭto nomata *Fićek*. Li ne havis ankoraŭ sian stirpermeson. Li demandis min ĉu mi ŝoforu. Mi jes havis la permesilon, sed ne la sperton. Estas li kiu konvinkis min ke mi kapablas kaj ke li helpos al **Ruža** kaj mi, ĉiam sidante apud la ŝoforo.

Kiam **Pajo** demandis min per kasetilo registri konversaciojn dum la novjara Espranto-renkontiĝo en **Germanio**, mi ne konsciis la gravan celon: ke mi estas helpanto por la kreado de la lerniloj laŭ la *Zagreba Metodo*. Poste, li komputile enskribis ĉiun vorton de mia kasetilo kaj faris liston de la plej oftaj vortoj. Tiel estis kreita lia Frekvencmorfemaro, la bazo de la lernolibro. La fama grupo preparis instrulibron kiun ankaŭ mi uzis en Montrealo (Kanado) aŭ dum ARE (Usono) ĉar vere la konversaciojn de Marko kaj Ana, mi ŝatas kiel la metodon.

Pajo estis tre helpema. Ĉi printempe kiam Spomenka ne sukcesis sendi al mi retleteron, do estas li kiu plusendis ĝin al mia adreso. Tio estis nia lasta komuniko. Tiam mi demandis pri la sano, li tuje respondis ke li bezonas aldonan oksigenon. Sed virusa tempo ne facilas…

Pajo, se vi povus aŭdi min – mi nur ŝatus diri al vi: **DANKON!**

Estas vi kiu helpis al mi evoluigi memfidon, tiom necesan kiam oni faras ion la unuan fojon. Viaj vortoj – *jes, vi kapablas*, ankoraŭ sonas en miaj oreloj. Mi feliĉas ĉar mi havis okazon renkonti vin, esti inter viaj geamikoj kaj travivi belajn kaj neforgeseblajn spertojn kaj agrablajn momentojn.

Zdravka Metz

- - - - - - - - - - -

Fotoj de Ivan Špoljarec - Štef.



La naskiĝdomo de Pajo - Stubička 75.



Pajo kun IKS-anoj antaŭ Amruševa 5, 1983.

La enterigo, la 11an de septembro 2020.



Pajo - la inspiranto de la kultura agado en Kroatio kaj Slovenio

***Melita Cimerman** el **Maribor** festparolis pri **Pajo** okaze de lia 70a vivojaro:*

Pajo naskiĝis en **Zagrebo**, kie li edukiĝis. Jam la elekto de liaj studobjektoj montras ke li havis maltrankvilan kaj scivolan spiriton, ke li frue komencis pensi pri la strukturo de la socio kaj pri la rolo de individuoj en ĝi. Neniam li sekvis la vojon kiun iu antaŭe fiksis, neniam li sekvis iun sen kritike pripensi, kvankam ĝuste lia kritikemo alportis al li malfacilaĵojn.

Lian vivon ni povas dividi al du ĉefaj ĉapitroj: la zagreba kaj la maribora. Dum la zagreba tempo li ne nur starigis fundamenton por sia intelekta evoluo sed li realigis siajn unuajn ideojn. Tre frue li komprenis ke la kulturo en la plej vasta senco de la vorto estas lia misio kaj tial li okupiĝis pri ĝiaj multaj aspektoj, ĝiaj multaj aperaĵoj. Samtempe li komprenis la kulturon kiel **Imanuel Kant,** kiel la ideon de la moralo, kiu la homojn direktas al bonaj agoj.

En **Zagrebo** li serĉis proprajn vojojn kaj klopodis realigi siajn proprajn ideojn. Kiel junulo li fariĝis entreprenisto en kulturo, li fondis sian propran kulturan entreprenon, kie la kulturo estis en la centro de la okupiĝo. Kun siaj kunlaborantoj li starigis Pupteatran Internacian Festivalon, kiu ĝis hodiaŭ vivas en **Zagrebo**. Li okupiĝis pri eldonado, serĉis nekutimajn labordefiojn kaj tiu eco restis la lia dum la tuta vivo. Li estis unu el tiuj raraj personoj kun sen longa hezito tuj kapablas rekoni la esencon de iu problemo kaj meti ĝin en pli vastan kuntekston.

Kiam li estis lernejano en elektroteknika lernejo, li renkontis Esperanton. Tiu lingvo tiom kaptis lin, ke liajn filinojn li edukis ne nur en la kroata sed paralele en Esperanto. Sed al Esperanto ne tiris **Pajon** nur la lingvo, kiel internacia komunikilo, sed ĉefe la ideo kaj la mesaĝo kiun tiu lingvo portas kun si.

Pajo dumvive portis en si la inspiron de **Zamenhof**, kiu celis “surbaze de la lingva interkompreniĝo detrui la murojn inter la popoloj kaj samtempe klopodi ke la homoj alkutimiĝu rigardi sian proksimulon kiel homan estaĵon, kiel fraton”. Li kredis al la penso ke la estimo de diversecoj inter diversaj kulturoj povus konservigi la mondan pacon.

Post tia trankvila kaj aranĝita vivo en **Kroatio**, okazis en la somero de la jaro 1991 io kio forte skuis la optimismon de **Pajo** kaj lian esperon pri la kunvivado en diverseco. La forto de grandaj ŝanĝoj detruis *status quo* en Eŭropo, tute specife en **Balkanio** kaj ŝovis la landon en la mezon de la militaj operacioj. Kiam ni en la vivo ŝanĝas nian kutiman ĉirkaŭaĵon, rilatojn, domon aŭ restadlokon, tio estas ofte tre suferiga. Sed post la komenca malbonfarto ekestas io nova, malfermiĝas novaj horizontoj, ni fariĝas pli fekseblaj kaj pli toleremaj kaj pli lernemaj. Tiel okazis al **Pajo**. Li forlasis la denaskan **Zagrebon**, sian domon kaj sian familion kaj serĉis novan lokon por vivi. Li venis al **Maribor**.



Zlatko Tišlajr - Pajo, 2012. Fotis Ivan Špoljarec

La stato en lia patrolando **Kroatio** kaj pli larĝe **Jugoslavio** lin forte maltrankviligis kiam li alvenis al **Maribor** kaj li daŭre pensadis pri la kialoj kiuj kaŭzis la detruiĝon de la mondo de lia junaĝo.

…

Sed **Pajo** apartenis al tiuj kiuj kapablis lasi sin al la fluoj de la tempo, kiu scias akcepti la sunajn kaj la ombrajn partojn de la vivo, kaj li tuj ekagis en novaj nefavoraj cirkonstancoj en la maribora epoko de sia vivo. Li rekomencis denove. Ĉi-foje ekipita per sperto, havante grandan kvanton da amikoj dise tra la mondo, kiuj dividis liajn ideojn kaj vivkonceptojn. Li denove fondis sian firmaon al kiu li donis nomon *Inter-kulturo* kaj okupiĝis pri la temoj kiel en la zagrebaj tempoj. Li eldonadis librojn en Esperanto kaj ebligis al iuj slovenaj verkistoj alveni per Esperanto ĝis malproksimaj legantoj alilandaj, ofte por ni ekzotaj (tiuj tradukoj ne estus okazintaj sen lia interveno, ĉar la traduko al ekzotaj lingvoj tro multe kostus). **Pajo** mem verkis plurajn librojn el la kampo de lingvoj kaj lingvopolitiko. Li ofte pri lingvaj kaj sociaj temoj prelegis eksterlande. Li organizis publikajn programojn dum kiuj li gastigis interesajn personojn de kies spertoj la aŭskultantoj povis multon lerni.



En la 90aj jaroj li partoprenis en la fondo de strataj festivaloj en **Celovec** kaj **Graz** en **Aŭstrio**. La festivalo la Strada eĉ hodiaŭ gajigas homojn en **Graz**. Li estis la iniciatinto kaj kunfodinto de Asocio por la eŭropa socio kiu lanĉis tre aktualajn forumojn pri Eŭropo en kiuj li la lokajn fakulojn informis pri malfacilaĵoj kaj specifaj ecoj kiujn alportos la eniro en **Eŭropan Union**. Inter la unuaj en **Slovenio** li jam en 1993 komencis kreadi eŭropajn projektojn, ĉiam sur la kampo de kulturo. Lingvo kaj ĉiuj ĝiaj ecoj estis ĉe li la ĉefa temo de intereso kaj studo. Li vidas la lingvon kiel ilon de komunikado kaj kiel medion, portanta en si la spiriton de la tempo kaj ebliganto de kulturo. Lia *Projekto pri diverseco kaj samtempa riĉo de la eŭropaj lingvoj* estis en 2006 atribuita la premio por la plej bona internacia projekto en **Slovenio.**

La dua temo kiu lin okupis estis la temo de la lingva identeco. Li estis konvinkita ke necesas komunaj ecoj kunligantaj ĉiujn loĝantojn de EU, sen tio ne eblos la ekzistado de la politika kreaĵo fondita sur la ekonomiaj kaj financaj fundamentoj. La loĝantoj de Eŭropa Unio devas scii respondi al la demando kio kunligas ilin kun la aliaj politikaj unuoj kaj kion ili deziras ke ilin kunligu. Tiujn projektojn li traktis ankaŭ kiam li enposteniĝis en Andragogia instituto en **Maribor** kiel la mentoro en la programo *Projekta instruado de gejunuloj*. Kun granda vivsperto, neelĉerprebla optimismo kaj per la akceptado de diverseco, li alportis en tiun programon novajn valorojn. Tiujn valorojn li transdonis al la gejunuloj kun granda komprenemo kaj amo kaj okazis ke foje li al la lernantoj anstataŭis la mankantajn familianojn.

Dum la epoko de **Maribor** li senlace edukiĝis kaj finis la formalan studadon en la Internacia universitato **San Marino** kun la temo: kibernetiko en la lingvoscienco.

Esperanto restis daŭre en la centro de lia intereso kaj agado. Tuj ĉe la alveno al **Maribor** li revivigis Esperanto-Societon **Maribor**, fariĝis lia tre agema sekretario, organizis renkontiĝojn, kursojn. Li transprenis la rolon de la sekretario de Eŭropa Esperanto-Unio kaj en **Maribor** organizis la internaciajn kongresojn en la jaroj 2004, 2005 kaj 2007.

Politike li subtenis la Verdan partion de **Slovenio** en kies loka unio en **Maribor** li agadis. Ankaŭ tie li atentigis pri neceso akcepti diversecojn, pensi pri la paca solvado de la problemoj, klopodi pri la socio kiu havu komprenemon por ĉiuj siaj membroj.

Zlatko Tišljar, konata al ĉiuj konatoj kiel **Pajo**, vivis inter **Zagrebo** kaj **Maribor**. En lia unua kaj la dua hejmlando oni egale respektis lin kaj estimis precipe pro lia interna povo kaj pozitiva energio, kiu helpadis al li sian vivsaĝon transdoni al ĉiuj ĉirkaŭ li.

Melita Cimerman

Eŭropa Esperanto-Unio
Por efika kaj malidiskriminacia komunikado
www.europo.eu

Poŝtmarko pri meteorito



Poŝtmarko pri la meteorito el Hrašćina eldonita

La 22an de oktobro 2020 Kroata poŝto lanĉis sian novan poŝtmarkon pri la meteorito el Hrašćina.


Ĝuste la meteorito de Hrašćina estis la motoro de unu programo de Kroata Esperanto-Ligo ekde la jaro 1995. Ekde tiam esperantistoj venadis al **Hrašćina** por kulturumi, renkonti interesajn verkistojn kaj muzikistojn, ekskursi, ĝui pejzaĝon de Zagorje kaj pikniki. La aranĝoj stimulis la kreon de la Esperanto-Klubo Trixini en **Hrašćina** 2012.

Renkontiĝoj de meteorito konsciigis la loĝantojn de **Hrašćina** pri la fenomeno meteorito el Hrašćina. La meteorito estas gardata en la Viena Naturscieneca muzeo sub la inventara numero 1. La meteorito venis el la kosmo al **Hrašćina** la 26an de majo 1751 kaj surteriĝis sur la kampo de la familio **Kiternaš**. La unuan fojon en la homa civilizo la alveno de la meteorito estis dokumentita per la oficiala protokolo de la pastro **Vuk Kukuljević** el la zagreba episkopejo. La viena fabrikposedanto **Alois von Widmannstätten** analizis peceton de la meteorito el **Hrašćina** (nomata ankoraŭ *la fero de Zagreb*) kaj konstatis ke en ĝia interno pro grandaj malvarmoj kreiĝis figuroj. Nuntempe la figuroj de *Widmannstätten* en iu objekto indikas ke la objekto ne estas terdevena sed ekstertera fenomeno.

La poŝtmarko pri la meteorito aperis en la serio *Mineraloj kaj rokoj de Respubliko Kroatio.* La meteorita poŝtmarko aperas en la bloko konsistanta el la meteorito el **Hrašćina** kaj roko Lithothanium-kalkŝtono. La valoro de ĉiu el du poŝtmarkoj en la bloko etas 5 kunaoj. La poŝtmarkan blokon dezajnis **Dean Roksandić**. Eldonkvanto 30.000.

S. Š.

Julia Sigmond “90”



Kelkajn monatojn antaŭ sia morto Julia Sigmond sendis por nia biblioteko sian lastan libron, portanta la titolon 90.

Tagmanĝo en la kosmo

Flugon en la kosmon oni rigardas kiel la kulminon de la homara progreso. La superhomo en la supermaŝino finfine venkis fortojn de la naturo. Tiukaze li ne povis manĝi iun ordinaran ĉiutagan manĝaĵon, oni devis kuiri por li ion pli funkcieblan.

Sciencistoj decidis jardekojn antaŭe kiuj estas ĉiuj nutraĵoj necesaj al la homa organismo kaj en kiaj kvantoj. Oni devis ilin nur izoli, senakvigi, kombini, vitaminigi, kompaktigi, paki, kaj la supermanĝaĵo estis preta por la enŝipigo.

La kosmoflugo estis ankaŭ ideala okazo por ke homo komencu nutri sin per piloloj. Globetoj, kubetoj, sesanguletoj, stumpaj konusetoj...

Ni ne scias, ĉu Juri Gagarin manĝis en la kosmo aŭ ne, sed oni pensas ke li enigis manĝaĵojn, alivorte li esploris ĉu eblas manĝi kaj trinki en la kondiĉoj de la mikra gravito.

Dungitoj de Kosmonaŭtika muzeo Sergej Korolov en Ĵitomiro, kaj Aeronaŭtika kaj kosmonaŭtika muzeo en Poltavo, ambaŭ en Ukrainio, ne konsentas. Ili asertas ke Gagarin, kvankam li havis manĝaĵon por dek tagoj, inkluzive aspikon kaj barĉon (en cent sesdekgramaj aluminiaj tuboj, kvazaŭ dentopasto), dum cent ok minutoj da flugo ne manĝis ion, sed nur sidis.

La unua en la kosmo kiu vere manĝis estis la kosmonaŭto German Titov, la 6-an de aŭgusto 1961. Titov, kiel Gagarin, havis je sia dispono nutrajn miksaĵojn de viandaĵoj, fruktoj, legomoj, kaj ĉokoladon. La manĝaĵo estis distribuita en kvar manĝojn, sed la homo suferis de spacmalsano, siaspeca movmalsano por astronaŭtoj (tiukaze por kosmonaŭtoj), kaj certe li ne satiĝis.

La unua virino kiu manĝis en la kosmo estis ankaŭ rusa, Valentina Vladimirovna Tereŝkova, lanĉita la 16-an de junio 1963. Dum du tagoj, ŝi rondiris super la Tero, nutrante sin per duonlikvaj substancoj el aluminiaj tuboj, kaj viandaj kaj fiŝaj kuboj, kaj ĉio estis en ordo ĝis ŝi manĝis stabiligitajn kukojn. Tiam ankaŭ ŝi malsaniĝis.

La restintajn manĝaĵojn ŝi distribuis al akceptkomitato sur kosmodromo, kaj poste ŝi plendis al ĵurnalistoj ke en la kosmo mankis al ŝi sekala pano, terpomo kaj cepo.



Valentina V. Tereškova

Kamelaĵo sur la menuo



Je la menuo de la novjara vespermanĝo ĉe la pariza restoracio Voisin dum la sieĝo de Parizo en franca-prusa milito, troviĝis ankaŭ kamelo. La besto estis alportita de la pariza bestoĝardeno, la sola fonto de viando post kiam la malsataj Parizanoj manĝis ĉiujn brutojn, ĉevalojn, hundojn kaj katojn.

La milito komencis en julio 1870, kaj jam meze de la aŭgusto estis evidente ke la germanoj gajnas, pro kio en la ĉefurbon, kie tiutempe loĝis inter miliono kaj duono kaj du milionoj da homoj, oni komencis alporti provizojn da cerealoj, kaj alkondukis brutojn de paŝtejoj al urbaj parkoj.

Oni distribuis ilin sur ĉiujn disponeblajn verdajn surfacojn: tri mil bovojn en botanikan ĝardenon, tridek mil bovojn kaj cent kvindek mil ŝafojn en la arbaron de Boulogne, ankoraŭ kelkajn milojn da ŝafoj en la ĝardenon de Luksemburgio, kaj milojn da porkoj kaj nenombreblajn kokobirdojn tra la urbon. La manĝaĵo sufiĉis dum du monatoj, kiom oni pensis ke la sieĝo povus daŭri.

Meze de novembro, post kiam tiuj du monatoj pasis, la germanoj ne retiriĝis, kaj Parizanoj jam formanĝis ĉiujn bestojn kiujn ili konsideris manĝeblaj. La malsataj loĝantoj komence turnis sin al ŝarĝobrutaro: ĉevaloj, muloj kaj azenoj, kaj poste al paseroj, hundoj, katoj kaj ratoj. Kun iomete da spicoj, hundaĵo povis pasi kiel ŝafidaĵo, kataĵo kiel kuniklaĵo. Iu kuiristo fascinita per bongusta, supla rataĵo, faris pastecon de rato, farĉitan per viando kaj graso de azeno, kaj li vendis ĝin por kvindek frankoj.

En la festotaga tempo en decembro, viciĝis loĝantoj de la bestĝardeno. Krom la kamelo menciita je la komenco, pereis kanguruoj, antilopoj, zebroj, ja eĉ de popolo ŝatataj elefantoj Kastoro kaj Polukso.

Branka Sacher

Malgraŭ la koronvirusa infekto, kiu ĝuste meze de septembro disvastiĝis ankaŭ en **Bjelovar**, Bjelovara esperantista societo ankaŭ ĉi-jare organizis sian tradician (jam la 8-an!) renkontiĝon **"Esperantistoj de Bjelovar al sia urbo"**. Tiu aranĝo okazas regule honore al festado de Tago de la urbo kaj Tago de bjelovaraj defendantoj, kun financa subteno de Urbo Bjelovar, kiu ne mankis ankaŭ ĉi-foje. Kun reduktita programo kaj ne pli ol 50 partoprenantoj, kun foresto de eksterlandanoj, la aranĝo okazis la 19-an de septembro, kvankam kelkaj programeroj por ĝenerala publiko komenciĝis pli frue kaj daŭris pli longe. Anstataŭ la planitaj vizito kaj prelego de la ĉilia esperantisto **José Antonio Vergara**, en la Popola biblioteko "Petar Preradović" okazis malgranda ekspozicio titolita "Kroatoj en Ĉilio". Bela ekspozicio "Akvareloj" de franca esperantistino kaj pentristino **Lilli Giloteaux** (1924-2013) dum unu monato ornamis la privatan galerieton de la dolĉaĵisto **Božidar Zagorac**.



La koktelo antaŭ la jarkunveno en Bjelovar, la 19an de septembro 2020. Fotis Sanja Forjan-Pleskina

La 19-an de septembro matene okazis sankta meso en Esperanto celebrita de franciskana esperantisto **Rikardo Patafta** en la preĝejo de Sankta Antonio de Padovo. Post la meso estis organizita riĉa koktelo en la preĝeja ĝardeno.



Kroata Esperanto-Ligo organizis specialan buseton el Zagrebo por partoprenantoj de sia jarkunveno, kiu okazis en la preĝeja prelegsaloneto. Post la jarkunveno okazis ekskurso al Dokumenta Esperanto-Centro en **Đurđevac**, kie dum la pasinta jaro estis instalita hejta sistemo kaj la arkiva kolekto iom post iom ricevas sian definitivan aspekton.

La eksursantoj daŭrigis la vojaĝon al la vilaĝo **Križnica**, kiu troviĝas inter la meandroj de la rivero Drava ĉelime de Hungario. En la tiea restoracio "Dravska Iža" estis organizita tagmanĝo por la ekskursantoj kaj prezentita nova eldonaĵo de Dokumenta Esperanto-Centro, la infanlibro "La aventuroj de Jombor kaj Miki" de la bulgara aŭtoro **Julian Modest,** kiun ilustris juna artistino **Ivana Pleskina**.

J.P.

12a boatado de Karlovac al Sisak

Dum dekdu jaroj Esperanto-Societo **Sisak** organizas kvintagan boatadon sur la rivero Kupa, de **Karlovac** ĝis **Sisak**. La boatado finiĝas je la Dankotago, la 5an de aŭgusto, kiam partoprenantoj bruligas kandelojn ĉe la monumentoj al la defendantoj. Tiu vojaĝo ankaŭ memorigas pri la gren-vojo, per kiu iam greno estis transportita al **Karlovac**, kaj poste per kalesko al **Rijeka**. La tria kialo de la vojaĝo estas la datreveno de la Esperanto-Societo **Sisak**, fondita en 1978

Nia grupo renkontiĝis en **Karlovac**: **Srećko**, el **Sisak** la vojaĝestro kaj lia filo **Ivan**, loĝanta en **Rijeka**, **Zlatko** kun la edzino **Luca** el **Karlovac** kaj mi. Ĉi-jare ni uzis du boatojn kaj la kanuon por aĵoj.

Navigado sur Kupa estas malfacila: herboj, malprofundoj kaj ŝtonoj malfaciligas la navigadon. Kvankam niaj teamestroj estis tre bravaj, ni piediris tre ofte kaj Ivan helpis multe.

Unuan tagon ni navigadis ĝis **Šišljević** (32 km), kun du haltoj, ĉe la enfluejo de la rivero **Mrežnica** kaj **Kamensko**. Ni alvenis al **Šišljević** vespere, kaj post la vespermanĝo starigis niajn tendojn.

Duan tagon ni haltis tri foje antaŭ alveno al Pokupsko (34 km): **Jamnička Kiselica**, **Lievi Štefanki** kaj **Auguštinovec** kie ni metis kandelojn sur la monumento memore al la Patrolanda milito.



Ĉe la enfluejo de rivero Mrežnica al rivero Sava.

La trian tagon komencis pluvi. Post la pluvo, ni daŭrigis la navigadon ĝis **Letovanić** (33 km), kun tri haltoj: **Šišinac**, ĉe la enfluejo de la rivero **Glina** en **Kupa**. Ni boatadis ĝis **Petrinja** (16 km). Pro la pluvo kaj malvarmiĝo ni rezignis pri la lasta parto de la navigado al la celo ĉe la urbo **Sisak**, 22 km for de **Petrinja**.

Mi verŝajne denove partoprenos en la belega tradicio kiu daŭru. Mi rekomendas ĝin al ĉiuj esperantistoj, sed oni devas scii ke la boatado estas vere aventuroplena kaj oni devas sin prepari por tio.

Ana Alebić-Juretić

160 JAROJ DE FERVOJOJ EN KROATIO

La 6-an de oktobro 2020 okazis prelego de **Zlatko Hinšt** pri interesa fervoja temo sub titolo **160 JAROJ DE FERVOJOJ EN KROATIO** en sidejo de Kroata Esperanto-Ligo (KEL), Zagreb, Vodnikova 9. Antaŭ 160 jaroj estis malfermita la unua fervoja linio en **Kroatio: Kotoriba-Macinec**, en la regiono **Međimurje**. Ĝi estis la parto de fervoja linio inter **Budapeŝto** tra N**agykanizs**a al **Kotoriba**, tra Čakovec al **Pragersko** en **Slovenio**. De tie estis ligo de la fervoja linio el **Vieno** al **Triesto.** Poste sekvis novaj fervojaj linioj kaj stacidomoj, sekvis disvolviĝo de trafiko kaj ekonomio, konstruado de industriaj objektoj ktp. En la jaro 2020 estas ankaŭ 100-jariĝo de konstruado de varstacio Črnomerec (1920). La 5-an de oktobro 1990 Kroata parlamento aprobis Leĝon pri kroataj fervojoj, sekve ni festis la 30-an jubilea jaro de Tago de Kroataj Fervojoj.

Kroataj fervojoj estis grave damaĝitaj dum la tertremo: aparte la zagreba ĉefa stacidomo kaj la bela konstruaĵo de Kroataj fervojoj en Mihanovićeva 12. Dum daŭras la riparlaboroj, esperantistoj-fervojistoj perdis siajn ejojn, ĉar tie laboras fervojaj oficistoj. Sekve, la oktobra prelego de d-ro Zlatko Hinšt okazis en Vodnikova kaj ne en la ejoj de KFEA. Ĉeestis dektri personoj.

Roža Brletić-Višnjić

Zlatko Hinšt prelegis okaze de 160 jaroj de fervojoj en Kroatio. Fotis Vlatka Škorić



LA NOVNASKITO

Kaja Farszky, la iama prezidantino de KEJA, fariĝis en oktobro patrino de la filo **Melvil**. Kaja salutas siajn geamikojn en Kroatio kaj prezentas al ni sian filon kaj lian patron Frédéric. La familio vivas en Bruselo.



ADIAŬ AL PAJO

Kroata Esperanto-Ligo kaj Esperanto-Societo *Tibor Sekelj* adiaŭis de **Pajo – Zlatko Tišljar** per la programo honore al li okazinta la 21an de oktobro 2020 en Vodnikova 9. Ĉeestis dudeko da personoj kaj virtuale **Zdravka Metz** kaj **Normando Fleury** el Kanado per zoom-programo. La programon gvidis **Spomenka Štimec**. Pajon oni prezentis per tekstoj de **Melita Cimerman** kaj **Zdravka Metz**. Pri li parolis **Spomenka Štimec**, **Judita Rey Hudeček**, **Damir Mikuličić**, **Will Firth** kaj **Ankica Jagnjić**. Inter dudeko da ĉeestintoj estis la familianoj **Ruža Tišljar** kaj **Bojan Tišljar.** Sur la foto de **Kruno Tišljar** la publiko sub la maskoj.

S.Š.



MAVRO ŠPICER EN LA ANTIKVAĴEJO

Zagreba antikvaĵisto proponis al ni elaĉeti la esperantajn kaj germanajn librojn de **Mavro Špicer,** unu el la plej gravaj pioniroj de la Kroata Esperanto-Movado. Li vendas ankaŭ lian Militistan vortaron. Ni prezentas al vi la fotojn el la kolekto. Volonte ni posedus tiujn librojn, sed... unue ni devas ripari niajn fumtubojn damaĝitaj dum la tertremo, aĉeti novan hejtilon, muntigi...

S.Š.





DAVOR KLOBUČAR

(1961 - 2020)



Inĝ. pri matematiko **Davor Klobučar** naskiĝis en **Osijek** la 30an de decembro 1961 kaj mortis en **Osijek** la 29an de julio 2020. La elementan lernejon kaj gimnazion finis en **Đakov**o.

Esperantistiĝis en la jaro 1983 en Studenta Esperanto-Klubo. Ekde 1999 prezidanto de Esperanto-Societo “Liberiga Stelo” en **Osijek**, vicprezidanto de Kroata Esperanto-Ligo ĝis 2020, ĉefdelegito de Universala Esperanto-Asocio por Kroatio 2016-2020.

Aŭtoris informbroŝuron *Esperantski mozaik* unua eld. Izvori 2000, la dua privata eldono en Osijek 2003. La libro kroatlingve amplekse prezentas la esperantan kulturon, idearon kaj la Movadon. Tradukis esperanten *Slavonian arbaron* de **Josip Kozarac**, turisman propekton de Osijek kaj Rijeka kaj *Zagreb kaj ĉirkaŭaĵo*, prizorgis per multaj esploroj la retejon de Kroata Esperanto-Ligo **www.esperanto.hr**.

Historiisto de la kroata (kaj slovena) Esperanto-Movado, publikigis rezultojn de siaj esploroj pri la komencoj de Esperanto en Kroatio (kaj Slovenio) en *Pet latica iz Osijeka,* Osijek *2009.* Laboris en Hrvatski telekom.

Ekde 1999 li reaktivigis Esperanto-Klubon “Liberiga Stelo” Osijek. La organizanto de la Tria kongreso de kroataj esperantistoj en Osijek 1999.

Rakontoj sub la lito, libro por infanoj de lia edzino **Antoaneto Klobučar** en lia traduko kaj kun ilustraĵoj de lia 12-jara filino **Ana Klobučar** estis proklamita por Infanlibro de la jaro 2004 de Universala Esperanto-Asocio. Tradukita japanen de **Sakeguči Ken**. La duan infanlibron, *Triopo Terura.* en la esperanta privata eldono de la tradukinto, eldonis Bajkamo en la japana traduko .

Partoprenis en multaj esperantlingvaj internaciaj kaj lokaj arangoj kaj fotodokumentis. Lian vojaĝlibron tra Japanio dum la Universala Kongreso de Esperanto en Japanio 2007 li verkis sub la titolo *Sayonara*, *Japanio*.

Sprita, multlingva, detalema kaj pacienca, li estis granda sponsoro de Kroata Esperanto-Ligo kaj de la esperantejo Vodnikova 9.

Lia lasta verko estis la kroatlingva milpaĝa, duvoluma *Matematika naša svagdašnja / Matamatiko nia ĉiutaga*.

S. Štimec









STJEPAN ŽARINA

(1944 - 2020)

Stjepan Žarina naskiĝis la 5-an de marto 1944 en **Drnek**. Inĝeniero pri laborорganizo, kaj kontadmanaĝero, laboris en grandaj firmaoj Velebit trgovina, RIZ kaj fine VT Zmaj en **Velika Gorica**. Li eklernis Esperanton en mezlernejo kaj nur poste aktiviĝis. Li estis la inicianto de la refondiĝo de Esperanto-Societo *Mondo Paca* en **Velika Gorica** en 2005 kaj ĝia prezidanto ĝis 2020. Kun neelĉerpebla energio li iniciatis plurajn Esperantajn arangojn kaj Esperanto-kursojn en **Velika Gorica,** inkluzive la 8a Kongreson de Kroataj Esperantistoj en **Velika Gorica** en 2010. Dum pluraj jaroj asembleano de Kroata Esperanto-Ligo kaj membro de Kontrolkomitato. En sia koro li portis la ideojn de humanismo kaj paco tutmonda kaj aktivis en pluraj similcelaj asocioj.

Li mortis la 27-a de septembro 2020 en **Velika Gorica** kaj estis enterigita en la tombejo de **Vukovina.**

M. B.



ĈU MORTO?

Mi ne vidis anĝelojn
nek lumegon fine de l' tunel'.
Mi ĉesis.
Mi malekzistis.
Pri ses tagoj neniu spur'.
Kio do la morto?
Por mi: nereveno al konsci'.
Por vi: konato senrevene forvojaĝinta.

Zlatko Tišljar - Pajo

MINACAS LA SORTO

Dum tie vi kuŝas en hospitalo
Sur tuboj pendanta
Kaj pensoj pri la vivo vin traflugas,
Mi tremas kiel juglanda ŝelo
Sur oceano vasta.

Senpovaj ni ambaŭ de l' destin' dependaj
En granda foro
Tamen en intima timo tre proksimaj.

Kun tiu moŝto sennoma konfrontitaj
Ni restas senvorte nepretaj.

Ĝis nun mi ne sciis ke kun vi min ligas
Abisma, angora timego
Pro iam venonta kaj neevitebla disiĝo.

Mi ne scias preĝi kaj dubas ke tio helpas
Sed mi silente kriegas
Konscia pri la senfina povo kiu
ekminacegis nian kunon.

Zlatko Tišljar - Pajo
Kopenhago, la 27-an de julio 2011

Foto: Ivan Špoljarec - Štef